

**Wim Jansen**

(emeritiĝinta el)

Universiteit van Amsterdam, Nederlando

## Sentesprimoj en Esperanto

### La rolo de la gramatiko

**Resumo:** Por la esprimo de sentoj Esperanto disponas interjekciojn, adverbojn uzatajn en funkcio simila al interjekcioj kaj aliajn relative fiksjajn esprimojn uzatajn en simila senco. Krome ĝi posedas nuancilojn uzatajn por esprimi propran komenton aŭ subjektivan modalecon de la parolanto. La aŭtoro studas la gramatikan formon kaj la ilokucian enhavon de la esperantaj sentesprimiloj sur la fono de la Funkcia Diskurs-Gramatiko. Li komparas la difinojn en la plej gravaj vortaroj kaj gramatikoj (*Plena Ilustrita Vortaro*, *Plena Analiza Gramatiko*, *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*) kun la lingvouzo de kelkaj tradukintoj de literaturaj verkoj (ĉefe Berveling: *Morgaŭ denove ni vidu*, De Diego: *La inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha* kaj Makaŝvili: *Kavaliro en tigra felo*). Apartan atenton li dediĉas al la multifunkcia vorto *ja*. Li neas la tezon de kelkaj aŭtoroj, laŭ kiuj la intonacio ludas la rolon de regula sentesprimilo. La studo diskutas la fakton, ke la plej multaj parolantoj de Esperanto lernas la lingvon inkluzive de la sentesprimiloj nedenaske.

**Ŝlosilvortoj:** sentesprimoj; interjekcioj; interjekcie uzataj vortoj kaj esprimoj

## 1 Enkonduko

En 1930 aperis *Esprimo de sentoj en Esperanto* de la pioniro Edmond Privat (1889–1962).<sup>1</sup> En la ĉapitroj 5 kaj 6, Privat inventaras la esprimajn rimedojn, kiujn li agnoskas en la lingvo: akcentado de frazeroj (fonologia rimedo),<sup>2</sup> ŝanĝo de la ordo de frazelementoj (sintaksa rimedo), konscia ripeto aŭ forigo

- 1 Redakcia noto: Ni funebras la aŭtoron de ĉi tiu artikolo. Wim Jansen forpasis en februaro 2024. Nekrologo aperas en ĉi tiu kajero de la revuo. La manuskripton de ĉi tiu artikolo Wim Jansen submetis al nia revuo en 2023. Ĝia teksto aperas en la vortumo finaprobata de la aŭtoro, sed la redaktan prilaboron kaj la aranĝon de la bibliografio laŭ la stilreguloj de la revuo ni ne plu povis interkonsenti kun li. La resumojn kaj la aŭtorinformojn aldonis Klaus Schubert (Esperanto), Christopher Gledhill (angla) kaj Marc van Oostendorp (nederlanda).
- 2 Privat (1957: 26) parolas pri “sona plilaŭtigo”, erare bazante la percepton de akcento sur la laŭteco de la prononcitaj sonoj, anstataŭ sur la ton-alteco kaj intonacia konturo.

de vortoj, specifa vortelektio kaj kreo kaj modifado de vortoj (leksikaj rimedoj). Per “modifado de vortoj” la aŭtoro aludas al la sistemo de vortfarado, antaŭ ĉio la derivado per leksikaj afiksoj kaj la memstarigo de tiuj afiksoj. Tiom pri la rimedoj, kiujn Privat resumis por la unua fojo en la lingva historio de Esperanto. Sed li volis pli. Inspirite de la laboroj kaj de la persona subteno de la fama lingvisto kaj stilisto Charles Bally, li revis vidi “studentojn esplori kaj priskribi, kiel Esperanto – aŭ alia lingvo – esprimas miron, admiron aŭ malŝaton k.t.p., kaj klasi la rimedojn *laŭ la bezonoj, kaj ne nur laŭ la eblecoj*” (Privat 1957, 46, mia kursivigo). En sia enkonduko la aŭtoro skribas, ke “la esprimbezonoj de la homa animo ne ŝanĝiĝas laŭ la ilo uzata” (Privat 1957, 7), tiel subtenante la ideon pri alta grado de universaleco de tiuj bezonoj.

Sekvante la preskaŭ jarcentaĝan sugeston de Privat, mi komencos la esploron ĉe la bezonoj. Niaj vortaroj kaj gramatikoj registras niajn rimedojn, sed evidente tiuj ne necese respondas la demandon, ĉu tiu nia rimedaro iel spegulas la bezonojn de la tutmonda parolantaro de Esperanto. Tiucele ni prefere konsultu manlibron pri la ĝenerala aŭ kompara lingvistiko kun specifa atento al la sentesprimaj aspektoj de la plej diversaj lingvoj. Tiu ĉi mia studo baziĝas ĉefe sur la anglalingva manlibro pri la Funkcia Diskurs-Gramatiko<sup>3</sup> (*Functional Discourse Grammar*, Hengeveld kaj Mackenzie 2008), universala lingvoteorio, kiu siavice forte apogiĝas sur interlingve komunaj tipologiaj fenomenoj. Alia mia celo estas iel komplementi la verkon de Privat, kiu koncentras sian atenton al la rolo de la leksiko, kaj prilumi la rolon de la gramatiko, tamen sen aparta atento al la instrumento de la vortordo en la esprimado de sentoj.

En sekcio 2 mi enkondukos la diskurs-agon kaj ĝian kernan komponanton, la ilokucion. Tiu ĉi esprimas la komunikan intencon de la parolanto, kiu akompanas la sekan semantikan enhavon de diraĵo. Sekcio 3 temas pri interjekcioj kiel la portantoj de sentesprimaj ilokucioj en ilia ekstreme reduktita formo de ekkrioj, ofte unuvortaj, en la plej bazaj diskursagoj. En sekcio 4 mi traktos la implicitajn ilokuciojn, kiuj ĉiuj respondas al iu frazostrukturo, karakterizanta la bazan komunikan intencon de la grandega plejmulto de la diraĵoj, kiujn ni produktas. Sekcio 5 detalos la manieron, kiel nuanci tiujn implicitajn ilokuciojn per sentesprimaj gramatikaj vortetoj aŭ partikuloj. En sekcio 6 mi resumos la konkludojn el la ĉi-prezentata studo.

3 “Diskurso” estu komprenata kiel unuo de lingva interkomunikiĝo, kiu povas etendiĝi de unuopa vorto ĝis ekster la limoj de la frazo, kiu tradicie ludas tiun rolon.

## 2 Enkonduke: diskursagoj kaj ilokucioj

En la Funkcia Diskurs-Gramatiko (FDG), la pragmatike difinita diskursago estas la baza unuo de la homa perlingva interkomunikiĝo. La parolanto aplikas al siaj diskursagoj la morfosintaksan kaj fonologian strukturojn de la uzata lingvo kaj produktas en la fina artikulacio la deziratan diraĵon. La parolanto havas la liberecon limigi aŭ vastigi sian diraĵon laŭ tio, kiel ŝ/li intencas komuniki kion al la alparolato. Jen necesas frazo, jen sufiĉas kohera vortgrupo, jen eĉ unuopa vorto por atingi la komunikan celon. FDG konsideras la elektitan diskursagon kompleta lingva esprimo, ankaŭ en la okazoj de subfrazaj fragmentaj diraĵoj. Ĉiu tia diskursago reflektas maksimume kvar elementojn: iun ilokucion (kiu estas la kerno de la diskursago), la parolanton, la alparolaton kaj iun komunikan enhavon. La ilokucio esprimas rekte aŭ nerekte la komunikan *intencon*. Per ĝi la parolanto garnas la komunikan enhavon de sia diskursago en ĉiu ajn komunika situacio, ofte per sentesprimo. Ilokucio, do, ĉiam ĉeestas en ĉiu diskursago, kaj lingvoj disponas pri multaj instrumentoj por vortumi ĝin, ĉu leksike, ĉu gramatike per la morfosintaksaj kaj/aŭ fonologiaj rimedoj, pri kiuj la koncernata lingvo disponas.

Da ilokucioj en lingvo povas ekzisti tiom, per kiom da intencoj aŭ nuancoj parolanto volas provizi siajn mesaĝojn, kaŝe aŭ malkaŝe. Ili etendiĝas de neŭtre deklara al demanda ilokucio, al diversaj ŝtupoj de peta al ordona ilokucio, kun intensigaj, mildigaj, ironiaj kaj multaj aliaj sentesprimaj nuancoj. Multaj el ili uzas celkonforman leksikan materialon, aliaj neleksikaj estas tiel sisteme uzataj, ke ili estas konsiderataj partoj de la gramatiko de la koncerna lingvo. Ofte aldoniĝas al la karakteriza morfosintaksa strukturo iu kroma, specifa frazmelodia aŭ intonacia strukturo. Foje la ilokucio, aŭ eĉ nuanco ene de ĝi, estas esprimata nur per aparta akcentado. En la priskribo de ilokucioj en Esperanto, mi preferas lasi la intonacion ekster la diskuto. Pri la entuta universaleco de pli aŭ malpli signifoplenaj intonaciaj konturoj ekzistas necerteco, kaj pri ilia manifestiĝo en Esperanto estas eĉ pli granda dubo, kiel skribas Wells (2010, 372): “Ĝiaj parolantoj [tiuj de Esperanto, W. J.] emas uzi la frazmelodion de la gepatra lingvo, supozante, ke ĉiuj komprenos.” Ja estas konate, ke la intonaciaj kutimoj povas varii de unu lingvo al alia, tiel ke, en la okazo de transpreno en Esperanton, nenio apriore garantias la celatan komprenon de tia paŭsaĵo.

Mi unue montros, kiel ilokucioj manifestiĝas en la plej simplaj diskursagoj en Esperanto – tiuj, kiuj manifestiĝas ekkrie, unuvorte aŭ malmultvorte – kaj kion tiuj observoj instruas al ni. Kiel literaturajn fontojn mi citas el materialo kun vigla enhavo kaj laŭeble multaj dialogoj. Por multaj ekzemploj mi elektis la tradukon el la hispana de *Don Quijote de La Mancha* far Fernando de Diego

(1977). Por havi senperan gepatralingvan komparon kun la sentesprimaj nuancoj de partikuloj, celitaj en iu originala teksto, mi turnis min al traduko el mia denaska nederlanda lingvo, la rakontaro *Morgaŭ denove ni vidu fare* de Gerrit Berveling (2002). Okaze mi citas ankaŭ el la epopeo *La Kavaliro en Tigra Felo*, tradukita de Zurab Makaŝvili (1989) el la kartvela.

### 3 Interjekcioj

La plej simpla sentesprimo okazas per interjekcio aŭ ekkrio. Interjekcioj estas iusence orfe traktata vortklaso kun malalta statuso, ne nur en Esperanto. Multaj el ili ne referencas al iu specifa semantika kategorio (entoj, kvalifikoj k.t.p.), kutime ne partoprenas en iu ajn vortfara procezo (kvankam en Esperanto tio ja eblas kaj okazas) kaj odoras iom primitive, apenaŭ pli bone ol blekoj kaj similaj onomatopeoj.

Por havi ideon pri tio, kiom da diversaj interjekcioj Esperanto ‘devus’ havi por ekkrieca esprimo, ni povas preni kielbazon la esplorrezultojn produktitajn de Paul Ekman dum la lastaj jardekoj. La ofte citata nombro da fundamentaj, universale rekoneblaj emocioj estas ses: tristeco, feliĉeco, timo, kolero, surprizo kaj abomeno.<sup>4</sup> Ekman (1999) nomas ankaŭ ĝojon, malestimon, eksciton, kulpon, orgojlon pri sukcesa prestado,<sup>5</sup> leĝerigon, kontentecon pri sukcesa prestado, sensan plezuron kaj honton fundamentaj emocioj. Estas dubinde, ke entute eblas, aŭ havas sencon, nombri emociojn, kiuj ja ofte aperas kiel kombinoj, kaj kies distingaj limoj povas esti tre svagaj. Se ni restas ĉe la nomitaj ses, ĉu por ili ni trovas taŭgajn interjekciojn?

Kiu penas konsulti niajn aŭtoritatajn gramatikojn kaj vortaron (PAG 1985; PMEG 2022 kaj PIV 2020) kaj la lastatempe eldonitan libron *Esprimaro* de Petro Desmet’ (2019), tiu malkovros la ekziston de 10–11 oficialaj interjekcioj kaj krome de ĉirkaŭ 25 interjekcioj kun ‘vortara’ fono kaj de ĉirkaŭ 53 interjekcioj, kiujn mi provizore baptas ‘aprioraj’ (vidu Aldonon 1).<sup>6</sup> La vortara grupo enhavas interjekciojn, baze de kiuj rolas aŭ leksikaj aŭ gramatikaj vortoj, do, vortaraj elementoj. Ekzemploj estas la radiko *brav-* en la interjekcia apliko *brave!*<sup>7</sup> por esprimi admiron, la radiko *help-* en *help!*

4 Kvankam la parolanto en ekkrio estas semantike la priagato de emocio (ekzemple, oni povas diri *ha!*, kiam oni surpriziĝas, ne kiam oni surprizas iun alian). Tamen, kongrue kun PIV, en la difinoj mi ĉiam uzas sendistinge la pli mallongan formon, t.e. ĝojo, surprizo, abomeno k.s.

5 Mi uzas la verbon *presti* kun la signifo ‘funkcii responde al establita normo, postulo, atendo’ k.s.

6 La ekzakta nombro, se entute difinebla, ne estas grava. Por tiu ĉi diskuto sufiĉas la grandordo kaj la interna variado, kiujn montras la kvar fontoj sume.

7 Izolitajn vortarajn interjekciojn en la kuranta teksto sen resendo al citaĵo mi provizas per krisigno por emfazi ilian interjekciecon.

por peti pri helpo, aŭ la prepozicio *ĝis* en la saluto *ĝis!* ‘*ĝis revido*’. La trian grupon mi nomas apriora, ĉar multaj ĝiaj membroj (ekzemple *be, ehe, ej, ho hu, hu ha* k.a.) spegulas la fizionomion de aprioraĵoj. Pro la manko de leksika apogo ili estas facile intermikseblaj kaj malfacile memorigeblaj, se ne uzataj ofte.

Reirante al la ses fundamentaj emocioj de Ekman kaj tra irante Aldonon 1, ni povus prove atribui *ve* kaj *pa* al tristeco, *hu* al timo, *fek* al kolero, *ha, aĥ* kaj *oho* al surprizo kaj *fi* al abomeno, dum neniu aparta ekkrio en Esperanto ŝajnas atribuebla al feliĉeco. Sed ni estu singardaj, ĉar ĉiuj difinoj estas proksimumaj, diversnuancaj interpreteblaj de diverskulturaj uzantoj de Esperanto kaj krome neelĉerpaj, t.e. ili ne ekskludas la partan kovron, en iu registrita interjekcio, de sentoj ne eksplicite menciitaj en la cititaj fontoj de Esperanto. Krome, por plenigi iun eventualan truon en la listo disponeblas *ho*, kiu estas la *je* inter la Esperantaj interjekcioj. Unuarigarde ŝajnas, do, ke la Esperanta interjekciaro estas pli ol sufiĉa por kovri la bezonon esprimi la universale rekoneblajn fundamentajn emociojn kaj eĉ multajn pliajn.

Interjekcioj estas gravaj elementoj ankaŭ en Esperanto, ĉar per si mem ili sufiĉas por konstrui kompletan diskursagon. Tiu diskursago estas la t.n. *esprimiva*, en kiu rolas la parolanto kaj ties senpera sentesprimo, sen mencio de iu alparolato kaj sen aldona komunika enhavo. Ekzemplo de tia interjekcio estas la abunde renkontata ekkrio *ho* en (1), kiu en la donita kunteksto celas esprimi malagrablan surpriziĝon de la parolanto:

(1) “Ho. Tion nur nun vi rakontas”, mi diris. (Baveling 2002, 25)

La diraĵo inter citiloj konsistas el du diskursagoj, *Ho* kaj *Tion nur nun vi rakontas*. La unua, *Ho*, laŭ la PIV-a difino “esprimanta tre ĝenerale la vivecon de sento”, nepre taŭgas en la pli vasta kunteksto de Baveling (2002, 25). La sekva citaĵo De Diego (1977, 47) klare demonstros la uzon de *ho* ligita al la koncepto ‘feliĉeco’: *Tre memkontenta do li [Don Kiĥoto] diris duonvoĉe, survoje al sia vilaĝo: –Vi certe povas nomi vin feliĉa super la ceteraj virinoj de la tero, ho Dulcinea, plej bela inter la belaj!* En ĝi, la “memkontenta”, feliĉa Don Kiĥoto proklamas sian adoratinon senkompare “feliĉa” en la alparolo “ho Dulcinea”.

Ĉiuj aliaj diskursagoj ol la strikte esprimivaj implikas la alparolaton kaj estas *komunikaj*. Inter ili, la unua subtipo estas tiu de la *interagaj*, kiuj simple antaŭvidas la atenton de la alparolato, kiel *Gratulon* en (2a) kaj la respondo *Koran dankon* en (2b). Hazarde, (2a) kaj (2b) apartenas al unu sama dialogo:

(2) a. “Gratulon”, mi diris. (Baveling 2002, 35)

b. “Koran dankon”, ŝi ekkriis. (Baveling 2002, 35)

Ĝenerale, tiel *gratulon!* kiel *koran dankon!* antaŭvidas la ĉeeston de

alparolato, ĉi-okaze la gratulato kaj la dankato. Aliaj interagaj diskursagoj estas ekzemple *brave!*, *vivu!*, *dankon!* kaj *pardonon!* (PAG 1985, 174). Ili ne havus sencon, se ne imagi la referencon al iu alparolato. En (2a,b) kaj similaj diskursagoj, leksika (vortara) materialo estas uzata sensanĝe en interjekcia rolo por esprimi la ilokucion. En etnaj lingvoj, leksikaĵoj en tia apliko estas ofte neŝanĝeblaj (kiel en proverboj), aŭ limigite ŝanĝeblaj, kondiĉite ekzemple de la kunteksto aŭ de la sociaj rilatoj inter la parolanto kaj la alparolato. Tamen, la Esperanta *gratulon!* estas ŝanĝebla en *gratulojn!* kaj anstataŭ *koran dankon!* la komparebla *multan dankon!* aŭ la pli simpla *dankon!* ŝajnas libere elekteblaj. Aliflanke, ĉi ties pluralo *\*dankojn!* estas laŭ nia komuna lingvosento kontraŭgramatika. Ankaŭ normala saluto kiel *bonan tagon!* ne estas senrezerve ŝanĝebla en *\*bonegan tagon!* La elekto de la vortara materialo en si mem estas tre limigita (al bondeziroj, salutoj k.s.) kaj, ene de tiu elekto, la variigeblo same. En iuj esprimoj sekvas, sed ne necese, aldono de komunika enhavo, kiu eksplacigas la alparolaton aŭ pliklarigas la sentesprimon en rilato al la alparolato. Ekzemplon de tio ni trovas en la tuta teksto post *Dankon* en (3):

(3) Dankon al Dio pro tiel multaj favoroj al li! (De Diego 1977, 297)

En (3) la diskursago enhavas kaj la esprimilon de la ilokucio, *Dankon*, kaj alparolaton kaj la kialon de la danko. En esprimivaj kaj interagaj diskursagoj ĉefrolas, do, interjekcioj, kiuj vortumas la ilokuciojn. Ni esploru iliajn manifestiĝojn iom pli detale kaj direktu nian atenton al la oficialaj, kaj inter tiuj la aprioraj *ha*, *he* kaj *ho*. Laŭ Aldono 1, la sencoj, kiujn ili esprimas, estas resumeblaj jene:

- *ha* esprimas ekmiron, surprizon antaŭ io bona aŭ malbona.
- *he* altiras ies atenton.
- *ho* esprimas tre ĝenerale la vivecon de sento, ofte uzata ĉe alparolo.

Malgraŭ la granda forma simileco inter *ha*, *he* kaj *ho*, iliaj sencoj sufiĉe klare diferencas inter si. Tamen De Diego (1977) – ĉu intence? – simpligas tiun variigeblon ĝis ekstremo. Sur okcent paĝoj en stile riĉa lingvaĵo notindas 66 aperoj de *ho*, kontraŭ 1 de *ha* kaj neniu *he*! La sola atestaĵo de *ha* estas (4):

(4) Ha ne! Ne tiel okazos, edzo. (De Diego 1977, 422)

Tiel esprimas sin Teresa, la edzino de Sancho, forte indignita pro la propono de Sancho edzinigi la filinon super ties socia stato. *Ha* klare reflektas krom la indigniĝo ankaŭ la miron de panjo Teresa, kiu ne volis kredi siajn orelojn. Tamen, iom pli supre, sampaĝe, ni legas en tre simila kunteksto: *Ho ne, kara, diris Teresa*. El la tuta stoko de *ho*-atestaĵoj, nur kvar estas sentesprimaj: *Ho ne, mi ne havas herbon en la cerbo...* (De Diego 1977, 219); *Ve, ho ve! ekkriis*

*la nevino* (De Diego 1977, 428); *Ho ve! Se almenaŭ la historiistoj dirus...* (De Diego 1977, 615); *Ho kiom da bele poluritaj kuleroj mi faros, kiam estos paŝtisto* (De Diego 1977, 777). Ĉiuj aliaj havas alvokan signifon, parencan al tiu de *he*. Resume, en De Diego (1977) *ho* uziĝas preskaŭ ĉiam por altiri la atenton de la alparolato kaj kelkfoje por esprimi senton. Restas unu *ha* kaj entute mankas *he*.

El la proklamita identeco (laŭ PAG 1985) de *he ho* kaj *hej ho* devus sekvi, ke *hej* estas varianto de *he*, malgraŭ tio, ke la unuopaj *he* kaj *hej* esprimas tute malsamajn ilokuciojn: respektive altiron de ies atento kaj kuraĝigon. En Makaŝvili (1989) la heroo de *La Kavaliro en Tigra Felo* alvokas kelkajn rajdantojn de malproksime per (5):

(5) Hej, fratoj, eble vi rabistoj estas? (Makaŝvili 1989, 54 strofo 195)

Sed tio montriĝas la sola apero en la verko de *hej* entute, en apliko, en kiu la oficiala *he* estus preferinda, aŭ eble la PAG-aj *ho ho* aŭ *ho hu* (pro la klara faktoro ‘malproksimo’ en la teksto). Sed ĉiuj tiuj mankas komplete, same kiel, cetere, *ha*. En sia uzo de *ho*, kaj en la distribuo de *ho* alvoka kaj *ho* sentesprimaj, Makaŝvili tre similas al De Diego. En la pli ol sesmil versoj de la epopeo estas 53 atestaĵoj de *ho*, inter kiuj estas 44 alvokaj. La ceteraj 9 dividas inter si esprimojn de doloro (dufoje), ekscito, dezirego, tristeco, sopiro, leĝeriĝo, amo kaj admiro. Jam en la dua strofo de la Prologo de Makaŝvili (1989), la aŭtoro alvokas Dion per *ho* en (6):

(6) Ho, unika Plejaltulo... (Makaŝvili 1989, 9)

Ĝis la ĵusa ekzemplo (6) mi observis en du tre ampleksaj verkoj kun viglaj dialogoj la preskaŭan neaperon de *ha* kiel sent-esprima interjekcio, favore al la homonimiĝo de *ho*, kiu en ambaŭ konservas la alvokan funkcion kaj transprenis la atent-altiran funkcion de *he*. Pli radikala multifunkciiĝo de interjekcio observeblas en la okazo de *hej*, kiu en Berveling (2002) kunigas en si sencojn, kiuj devus esti tute fremdaj al ĝi laŭdifine. Ni vidu la ekzemplojn sub (7):

- (7) a. “Ne”, li respondis. Hej,... (Berveling 2002, 12: *Hej* esprimanta seniluziiĝon pro la antaŭa ne).  
 b. Hej, vi foje rigardu. (Berveling 2002, 21: *Hej* en alparolo).  
 c. Hej, tiu unu ino... (Berveling 2002, 35: *Hej* esprimanta rezignacion pro mem provokita viktimiĝo).  
 d. “De kie ... vi venas?” “Hej?” ŝi demandis. (Berveling 2002, 43: *Hej* esprimanta miron).  
 e. Pri ho, hej... Nu, diru do. (Berveling 2002, 13: *Hej* anoncas hezitan paŭzon por gajni tempon).

La interkrampe aldonitaj informoj pri la koncernaj ilokucioj estas tiuj de la nederlanda originalo, kiujn la tradukoj devus reflekti. Certe, iom da kuraĝigo (laŭ la PIV-a difino de *hej*) enestas en la sekvoj post *hej* en (7a,b,e), sed neniu *hej* diveneble kovras la kernan sentesprimon de la originalo, kiuj estas seniluziigo, rezignacio, miro kaj paŭzo, krom en (7b), se ni akceptus la identecon inter la neoficiala *hej* kaj la oficiala atent-altira *he* (vidu supre). Tamen, estus nejuste atribui la tutan ŝarĝon de tiu funkcia ekspansio de *hej* al la tradukinto, kiu baraktis per ne tre klaraj armiloj kun la preskaŭ netradukeble rafinita lingvaĵo de la originalo. Provizore lia sola savo ŝajnas esti la akcepto de helpo de la universala *ho*.

Se la observitaj tendencoj, kiuj tuŝas *ha*, *he*, *hej* kaj *ho*, montriĝas neizolitaj, sed pli ĝeneralaj, oni povas demandi sin, ĉu la abundo da inter si apriorice similaj formoj kun celitaj sencodiferencoj estas, anstataŭ konservinda riĉaĵo, fonto de konfuziĝo, kiun la uzantoj klopodas purigi, eliminante la superfluaĵojn. Krome (vidu Aldonon 1): ĉu estas identaj la uzokampoj de la triopo *ĉit*, *ŝs* kaj *ts* por silentigi iun? La samo validas por *pru* kaj *tpr* por haltigi ĉevalon (kaj kiel respondos ĉevalo al *tpr*, ĉu per ekscitiĝo aŭ per halto?). Kiam mi ekkrias *aj*, ĉu oni interpretas tion kiel esprimon de doloro aŭ de viva ĝojo? Ĉu *baf* estas egala al *ba*, aŭ pli forta ol *ĝi*? La handikapo de preskaŭ ĉiuj parolantoj de Esperanto ja estas, ke ili lernas la lingvon kune kun ĝiaj interjekcioj ne denaske, sed plenkreskule, laŭ tute alia vojo ol denaskulo, kiu lernas sian hejme, en la infanvartejo kaj infanĝardeno, en ludoj kaj en rakontoj kaj kantoj, ekde frua fazo en la akirado de la lingvo. Sen tiu apogo, la Esperanto-parolanto facile riskas missenti la malsamajn, aŭ la perfide similajn emociajn ŝarĝojn de multaj aprioraĵoj, kaj misorientiĝi inter iliaj eventuale malsamaj uzokampoj. Ankaŭ la diferencon inter la Esperantaj vortoj *seĝo* kaj *tablo* oni kutime lernas plenkreskule kaj el vortaro, sed oni asocias ambaŭ al facile stokeblaj bildoj. Neniu Esperanto-parolanto misuzas unu por la alia, kaj neniu aŭskultanto misperceptas ilin. La samo povus validi ankaŭ por la interjekcioj, sed la tubero en la afero estas, ke ili respondas ne al iu klare difinita semantika kategorio, sed al malpli facile kaptebla sentesprimo, kies ekzemplodona uziĝo en la praktiko estas, krome, misgvide malunueca. Pro tio, ke ne ekzistas propre Esperanta akcentado aŭ neakcentado de multaj interjekcioj en ilia kunteksto, ia ajn elpensita akcento restas neuzebla por komplementi neprecize difinitan ilokucion aŭ por sence distingi inter du homonimoj.

Evidente, la vortaraj interjekcioj prezentas nek pure enhavan problemon, nek facilan miskomprenblon pri sia uzokampo. Kiel leksikaj aŭ gramatikaj vortoj ili ĝuas vastan konatecon, kaj la formoj *halt!* kaj *help!* ilustras, ke interjekcie uzataj radikoj povas vivi eĉ sen tiu minimuma modifeblo, kiun mi riparolis en rilato al *gratulon!* kaj *dankon!* post (2).



## 4 Implicitaj ilokucioj de plena diskursago

La dua subtipo inter la komunikaj diskursagoj estas la *plenaj*, kiuj devige havas, krom la ĉiam ĉeesta ilokucio, plenan komunikan enhavon. La ilokucio de tia plena diskursago, efikanta sur la tutan komunikan enhavon, estas nomata gramatika aŭ implicita, kaj ĝi reflektiĝas en karakteriza sintaksa strukturo. Ilia suma nombro ne estas bone difinita, kaj ne ĉiuj lingvoj uzas la saman elekton el tiu sumo. La ĉi-suba listo de implicitaj ilokucioj, realigataj en Esperanto, estas bazita sur pli ampleksa 11-tipa inventaro en Hengeveld kaj Mackenzie (2008), korektita de Hengeveld kaj Olbertz (2012). Kvankam temas pri tre komunuzaj strukturoj, mi donos la ilustraĵajn frazojn (8)–(14) laŭ ekzemploj el De Diego (1977).

Per la *deklara* ilokucio la parolanto neŭtre informas la alparolaton pri la komunika enhavo. La karakteriza frazostrukturo en Esperanto estas SV(O) aŭ SV<sub>k</sub>N/Adj kun verbo aŭ kopulo en la indikativa modo:<sup>8</sup>

- (7) Don Quijote dir-is adiaŭon al la kapristo. (De Diego 1977, 177)
- s                      v-IND      o

Per la *demanda* ilokucio la parolanto petas la alparolaton pri respondo koncerne la komunikan enhavon. La karakteriza frazostrukturo en Esperanto komenciĝas per *ĉu* aŭ per demanda korelativo *k-* kaj daŭrigas per senŝanĝa SV(O) aŭ SV<sub>k</sub>N/Adj kun verbo aŭ kopulo en la indikativa modo, same kiel en la deklara ilokucio.

- (8) Ĉu vi trov-is ian pruvon? (De Diego 1977, 181)
- DEM s                      v-IND                      o

Per la *ordona* ilokucio la parolanto ordonas la alparolaton plenumi la agon entenatan en la komunika enhavo. La karakteriza sintaksa strukturo en Esperanto estas sensubjekta, V(O) aŭ V<sub>k</sub>N/Adj kun la verbo en la volitiva modo:

- (9) Redon-u ĝin al mi! (De Diego 1977, 237)
- v-VOL                      o

La frazostrukturoj en (8)–(10) karakterizas la deklaran, demandan kaj ordonan ilokuciojn laŭ la respektivaj difinoj, sed oni komprenu, ke reale tiuj difinoj establas ne pli ol la ĝeneraligitan komunikan potencialon surbaze de la formaj aspektoj kaj semantika enhavo de la diraĵo. Helpate de nombro da kuntekstaj kondiĉoj ili decide kundifinas la finfinan komunikan potencialon de la diskursago (König kaj Siemund 2007, 1).

<sup>8</sup> Mallongigoj en la teksto: adj Adjektivo. dem Demanda partikulo. ind Indikativa modo. n Nomo, substantivo. neg Negacio. o Objekto. pl Pluralo. s Subjekto. sg Singularo. v Verbo. v<sub>k</sub> Kopulo. vol Volitiva modo. 1, 2, 3 Numero de la subjekta persono.

Per la *dezira* ilokucio la parolanto informas la alparolaton pri sia deziro, ke la cirkonstancoj elvokitaj de la komunika enhavo efektiviĝu. La karakteriza frazostrukturo en Esperanto estas SV(O) aŭ SV<sub>k</sub>N/Adj kun dua- aŭ triapersona subjekto, kaj verbo aŭ kopulo en la volitiva modo:

(10) Vi ne forges-u vian promeson kaj ĵuron. (De Diego 1977, 47)

S.2SG NEG V-VOL O

(11) Ili kaŝ-u sin post kelkaj rokoj. (De Diego 1977, 205)

S.3PL V-VOL O

Per la *instiga* ilokucio la parolanto kuraĝigas sin mem aŭ kunparolanton kune plenumi la agon entenatan en la komunika enhavo. La karakteriza frazostrukturo en Esperanto estas SV(O) aŭ SV<sub>k</sub>N/Adj kun unuapersona subjekto, kaj verbo aŭ kopulo en la volitiva modo:

(12) Mi reven-u do al mia simpla piedirado. (De Diego 1977, 698)

S.1SG V-VOL

(13) Ni sav-u la filon. (De Diego 1977, 55)

S.1PL V-VOL O

La volitiva modo kun la finaĵo *-u* estas uzata tiel por la ordona ilokucio kaj ankaŭ por la sekvaj dezira kaj instiga ilokucioj. Malgraŭ tio mi preferas ne kungrupigi la tri ilokuciojn en unu volitivan ilokucion, ĉar la foresto de eksplicita subjekto insiste diferencigas la ordonon de la aliaj du, kaj la personeco de nepre ĉeesta subjekto, siavice, diferencigas la deziron, ke iu faru ion, disde la instigo, ke mi/ni faru ion (vidu pri tiu kunigeblo/disigeblo ankaŭ König kaj Siemund 2007, 5, 35).

El la inventaro de 11, Esperanto rekonas, do, kvin, tiujn samajn de la angla, la komparlingvo en Hengeveld kaj Mackenzie (2008), sed ne nur (vidu König kaj Siemund 2007 pri la eŭropeco de la fenomeno). En propra miksaĵo, Esperanto heredis de siaj eŭropaj fontlingvoj la bazajn vortordojn SV(O) kaj SV<sub>k</sub>N/Adj; demandan partikulon kaj demandajn korelativojn por distingi demandan disde deklara esprimo, kaj la uzon de la indikativa kaj volitiva modoj por kompareblaj, kvankam ne identaj, celoj en la fontlingvoj. Sekve, ne estas surprize, ke Esperanto rekonas ĝuste tiujn kvin nomitajn ilokuciojn. Kun la transpreno de la supre cititaj gramatikaj karakteriziloj el siaj eŭropaj fontlingvoj, Esperanto transprenis ankaŭ ilin. La ses ilokucioj de Hengeveld kaj Mackenzie (2008), kiuj mankas en gramatikerigita formo en Esperanto, estas multe malpli ofte atestataj tutmonde.

## 5 Nuanciloj

Kiel klarigite supre, plenaj diskursagoj en Esperanto estas karakterizitaj de implicita lokucio realigita pere de iu el kvin normaj frazotipoj. Tiuj frazotipoj estas kolektive konataj de ĉiu parolanto de la lingvo. Laŭbezone, la individua parolanto povas aldoni al tiu baza implicita ilokucio sian propran komenton kaj esprimi per ĝi iun subjektivan modalecon aŭ sentesprimon de la diskursago. Temas ĉi tie pri pragmatike decidita sentesprimo, per kiu la parolanto malkaŝas sian sintenon, sian opinion pri la seka semantika enhavo de sia diraĵo. La subjektiva modaleco estas esprimebla per ĉiaj rimedoj, interalie per kvalifikaj adjektoj (*bonŝance!*, *bedaŭrinde!* k.s.), sed ankaŭ per partikuloj. Mi proponas resumi tiujn ĉi sub la komuna denominato ‘nuanciloj’.

La forto de partikulaj nuanciloj estas, ke ili estas ne leksikeroj, sed gramatikeroj, kaj sekve uzeblaj praktike sen kunteksta rezervo. Hengeveld kaj Mackenzie (2008) mencias por la nederlanda kaj angla nuancilojn por apliki ironion al la deklara ilokucio, kaj plifortigon kaj plimildigon al la demanda aŭ la ordona ilokucio. En la koncernaj sekcioj de la nederlanda gramatiko ANS (2021, § 21.4.9.4.2), oni trovas ĝis ses nuancilojn, kiuj subtile tuŝas per sentesprimo la komunikan intencon de la parolanto. Ne estas facile doni por ĉiu el ili po unu precizan kaj elĉerpan tradukon, sed sume ili reprezentas pli malpli jenajn nuancojn: ironio, malpacienco, irito, rezignacio, milda insisto, plifortigo de demando/ordono, plimildigo de demando/ordono. Krome, tiuj ses partikuloj en la nederlanda povas kombiniĝi inter si en duopojn aŭ eĉ triopojn, kun novaj subtilaj nuanc-diferencoj. Se, fine, ni alkalkulas la diferencigan forton de la akcentado, tiel en la angla, kiel en la nederlanda, ni trovas, do, abundan fonton da esprimebloj per partikuloj en ĉi tiuj du lingvoj. Eĉ sen minimuma pretendo pri la interlingva reprezentivo de ĉi-supraj nuancoj, ni povas preni ilin kiel provizoran bazon por provi fari komparan analizon kun Esperanto. Tiucele mi ĉerpis el la *Universala Vortaro* (Zamenhof 1963, 137–233, origine de 1905)<sup>9</sup> kaj kontrolis en PIV (2020) eventualajn kandidatojn por la rolo de nuancilo, kaj kompilis ĉi-suban Tabelon 1 de unu- kaj dusilabaj adverboj, memstaraj morfemoj kiel afiksoj kaj interjekcioj.

9 La reiron al la bazo de 1905 pravigas la tempa stabileco de gramatikaj vortoj en la vortaro.

	Difino (koncizigita) laŭ PIV
do	Partikulo <sup>1</sup> uzata en demandaj aŭ ordonaj frazoj, por insisti pri la miro aŭ la volo.
ja	Partikulo, uzata por akcenti, emfazi la realecon de ideo entenata en frazo aŭ en vorto. RIM. Nur por aparta forta efekto Zamenhof metis <i>ja</i> en la komenco de frazo. → <i>jes</i> .
jen	Partikulo uzata por: <sup>1</sup> Altiri la rigardon sur iun aŭ ion. <sup>2</sup> Altiri la atenton sur ion. <sup>3</sup> Prezenti pli vigle ian subitan okazaĵon.
jes	<sup>1</sup> Morfemo, rolanta kiel frazo, per kiu oni asertas vera la tuton de la demanda frazo. RIM. evitinda estas la uzo de <i>jes</i> en la rolo kaj senco de <i>ja</i> .
nur	Partikulo uzata <sup>1</sup> ...por signifi “ne pli ol”. <sup>2</sup> ... por signifi “ne (mal)pli frue ol”. <sup>3</sup> ... por signifi “nenio/u alia ol”, “ne alie ol”. <sup>4</sup> ... por signifi “ne alie ol”.
tamen	Cirkonstanca morfemo, signifanta “malgraŭ tio”.

Tabelo 1: Partikuloj kiel eventualaj interjekcioj aŭ nuanciloj.

Tuj klariĝas el Tabelo 1, ke por la plifortigita demando aŭ ordono prezentiĝas la partikulo *do*, kiel montras ankaŭ (15a) kaj (15b) el Berveling (2002):

- (14) a. “Ĉu vi do amas beton?” (Berveling 2002, 11)  
 b. “Ĉu vi kuniros? [...] Venu do.” (Berveling 2002, 27)

Ankaŭ pravas lia uzo de *do* kun la imperativo *Envenu do* (Berveling 2002, 27) kaj en la demando *Ĉu vi do scias, ke...* (Berveling 2002, 31). Berveling uzas eĉ duopan plifortigon per interjekcio kaj partikulo en *Nu, diru do* (Berveling 2002, 13).

De Diego (1977) uzas ekskluzive *do*, plimulte kun ties alia signifo ‘sekve/ rezulte’, kiu ne interesas nin ĉi-kadre, sed ankaŭ kelkdekon da fojoj kiel plifortigilon, ĉefe en demandoj, malpli en ordonoj. Ekzemploj estas *Ankaŭ vi do ricevis vergojn?* (De Diego 1977, 118); *Ĉu ĉi tio estas do gastejo?* (De Diego 1977, 120) kaj *Laŭdatu do la aŭtoro...!* (De Diego 1977, 113). *Nu*, en De Diego (1977) estas interjekcio: neniu el la tri atestaĵoj de *nu* en la tuta verko reprezentas plifortigan nuancilon.

Kvankam mankas partikulo kun eksplicite preta difino kiel kandidata mildigilo de demando aŭ ordono, Tabelo 1 pensigas pri *nur* por tiu rolo. Kun sia ĝenerala senco de limigo, malgrandigo aŭ malstriktigo, ĝi ŝajnas taŭga kandidato por la celata rolo, tute same kiel ĝia nederlanda ekvivalento *maar* (unu el kies esperantigoj estas ĝuste *nur*). Fakte, (16) el Berveling (2002) indikas la vojon:

- (15) Atendu nur. (Berveling 2002, 46, laŭ la nederlanda originalo kun mildigita ordono)

En sia adverba rolo, *nur* koncernas la frazeron, kiu sekvas post ĝi. Por la mildiga partikulo oni povus rezoni analoge. Tiam, ĉar en (16) la mildigo trafas *atendu*, la mildigita ordono povus teksti *Nur atendu*. Tamen, tiu ĉi strukturo povas kaŭzi konfuzeblon inter la semantika kaj la pragmatika interpreto de la diraĵo. Ni prenu la ekzemplon de *Nur pagu* kun la semantika interpreto “Plenumu la pagon por konfirmi la mendon” en la okazo de antaŭpago, kontraŭ la pragmatika interpreto de *Pagu nur*, t.e. “Pagu por fari komplezon kaj eviti disputon”. Por konservi tiun distingeblon, *Atendu nur* kiel mildiga komplemento de la insista *Atendu do*, povas esti preferinda. Cetere, De Smedt (2004, 355) mencias *Ridu nur* (kaj ne *Nur ridu*), sed tie povus temi pri fidela paŭsaĵo el la nederlanda, kiu ja antaŭvidas nur tiun pozicion.

La ceteraj kvar vortetoj en Tabelo 1 neniel montriĝas taŭgaj por esprimi unu el la mankantaj sentesprimoj: ironio, malpacienco, irito, rezignacio, milda insisto. Tamen, la daŭrigo de nia esploro de supre suben, komence de *ja*, rivelos interesan ekskurson.

Pro sia difino en PIV (2020), *ja* provokas nian apartan atenton. La naci-lingvaj tradukoj en la *Universala Vortaro* de Zamenhof (1963, 173) klare montras, ke la fonto de *ja* estas la germana *ja*, kaj la aliaj vort-tradukoj negermanaj konfirmas la transprenon de *ja* kun ties germana signifo. Tiun signifon ni klare retrovas en la priskriboj (17a,b) de la Esperanta *ja* en Krause (1999, 316):

(16) *Ja* aldonas al diraĵo la nuancon de:

- a. Jama konateco, evidenteco aŭ komprenebleco de la komunika enhavo.
- b. Koncedo aŭ konfeso pri la komunika enhavo.
- c. Nea respondo al nea demando (kun Jes ja!, en kiu ja estu akcentita).

Eblas ilustri tion plej trafe pere de la ekzemploj (18a-h) en PIV (2020):

(17) a. *Tio ne estas ja peko, ne povas esti peko!*

La parolanto konfesas, ke la koncepto peko estas konata ankaŭ al ŝ/li, kaj deklaras ĝin netrafa en tiu ĉi kunteksto.

b. *Nu, vi ja estas virinoj!*

La parolanto klarigas aŭditan aserton per la supoze konata atribuo de bona intuicio al virinoj.

c. *Sed ni ja scias, ke da lingvoj ekzistas tre multe.*

La parolanto konfirmas kiel konatan fakton, ke ekzistas multaj lingvoj.

d. *Sed tie la vivo estos ja tute alia.*

La parolanto apogas sian aserton sur la jama konateco de la *alieco* kiel fakto.

- e. *Sed mi ja mem venis al tiuj ideoj.*  
La parolanto koncedas, ke ŝ/li mem venis al tiuj ideoj.
- f. *De la tago restas ja ankoraŭ multe.*  
La tagodaŭro estas konata fakto, kaj en la kunteksto restas multaj horoj ĝis la fino.
- g. *Mi kaj Marta ni konas ja nin de la infaneco.*  
Klariga konfeso pri fakto.
- h. *Se vi ne havos per kio pagi, oni ja prenos vian litaĵon de sub vi.*  
La parolanto konfesas, ke ŝ/li konas la punon en okazo de nepago.

La difinoj (17a,b) de *ja* ĉe Krause trovas apogon ankaŭ en la unua teksto, en kiu Zamenhof uzis ĝin. Temas pri kvin okazoj en la fabelo ‘La Ombro’ en la *Dua Libro* (Zamenhof 1888/1987, 69–72), senŝanĝe retroveblaj en *Fabeloj de Andersen* (Andersen 1992, 376–378). La difino (17c) kun akcentita *ja* (!) ne trovas respondon inter la ekzemploj (18).

La difino de *ja* en PIV (2020), “akcenti, emfazi la realecon de ideo entenata en frazo aŭ en vorto”, ŝajnas nerilatigebla al la ekzemploj en PIV mem, nek al tiuj en la Zamenhofaj tekstoj. En simila kontrasto kun Krause (17a,b), PAG (1985 127) priskribas *ja* kiel adverbos, kiu “normale staras post la vorto, kiun ĝi emfazas”, kun ekzemploj, kiuj tamen konformas al la uzokondiĉoj de (17a,b). Krome, PAG (1985 297) deklaras, ke en adversa frazo “ĉe akra kontrasto oni uzas *sed ja* ... ĉe insista aŭ surpriza ... kontraŭeco”, kun ekzemploj, kiuj ĉi-foje reflektas la uzokondiĉojn de (17b). En speciale emfazita ordono, PAG (1985 365) citas *Li venu ja!* kun *ja* kiel sinonimo de *do*. Tiu ĉi lasta uzo jam estas neniel akordigebla kun (18). La kontrasto inter unuflanke ĉiuj cititaj ekzemploj kaj aliflanke la difinoj en PIV kaj PAG kondukas al la neevitebla konkludo, ke tiuj ĉi lastaj estas misdifinoj, en kruda kontrasto kun (17a,b). Ankaŭ PMEG (2022, §14.3.10) nomas *ja* emfaza vorto, “kiu insistas pri la vereco de la diraĵo”, en kiu “vereco” ŝajnas al mi eĉ pli misa ol la “realeco” en PAG kaj PIV. Cetere, ankaŭ la ekzemplaj frazoj en PMEG perfekte respondas al la uzokondiĉoj (17a,b). Tie, kie PMEG samparagrafe asertas, ke “en pozitivaj frazoj *ja* estas la malo de *ne*”, ĝi proklamas riskan tezon, kiu pensigas pri (17c), al kiu mi volas reveni poste. Kaj plue: “ĝi emfazas, ke la frazo estas pozitiva” (mia kursivigo), sed PAG limigas la emfazokapablon al la vorto tuj antaŭ *ja*. Fine: “sed *ja* povas ankaŭ esti uzata kune kun nea vorto. Tiam *ja* akcentas la neadon”, sekvate de du ekzemploj kun *ja ne*, en kiu *ja* staras antaŭ la vorto *ne*, kiun ĝi emfazas, en forta kontrasto kun PAG (1985 127), kiu volas ĝin post la emfazata vorto. La koncerna paragrafo en PMEG finiĝas per averto pri la konfuzeblo de *ja* kun *jes*, kiu estis fakte la motivo, kial mi enlasis *jes* en la rikolton de Tabelo 1.

De kie, do, venas tiu plusendo de *ja* al *jes* en PIV (2020), en kiu oni legas: “evitinda estas la uzo de *jes* en la rolo kaj senco de *ja*”? Unu el la fontoj de

tiu misuzo estas la nesimetrijo en la esprimoj de polareco en Esperanto. Por esprimi la pozitivan polarecon (jeson) de diskursago, Esperanto disponas pri la interjekcio *jes*, kiu ne estas uzebla kiel partikulo, kaj por la negativa polareco ĝi disponas pri la interjekcio *ne* kaj la partikulo *ne*. Kiel en multaj aliaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto la negativa polareco estas markita (per *ne*), kontraŭe al la pozitiva. Tio signifas, ke deklara diskursago estas pozitiva jam pro la neĉeesto de *ne*, dum ĝia negativa varianto postulas la ĉeeston de *ne*. Tio povas krei problemon en situacioj, en kiuj alparolato volas respondi nee al demando de parolanto, kiu enhavas neon (*ne* aŭ, ekzemple, *nenion*). En tiaj kondiĉoj, la alparolato povas senti la bezonon de emfaza malneo de la pridemandita neo, alivorte de emfaza jeso: *jes* (17c)! PMEG (2022, §22.4), donas interesan superrigardon de du ekzistantaj respondsistemoj, el kiuj mi citas du dialogojn en la t.n. okcidenta sistemo:

- (18) a. Ĉu vi volas kafon? Ne! Mi ne volas kafon.  
 b. Ĉu vi nenion deziras? Jes! Mi ja deziras ion.

Al la demando en (19a) la alparolato povas respondi per *Ne* aŭ, pli amplekse, per *Mi ne volas kafon* aŭ per ambaŭ. La interjekcio *ne* ripetigas en la samforma partikulo *ne*. Sed en (19b) la respondo *Jes*, kontraŭa al la sugesto en la demando, ne estas etendebila al *\*Mi jes deziras tion*, ĉar *jes* estas interjekcio, kiu okupas la eksterpredikatan frazkomencan pozicion aŭ eĉ eksterfrazan lokon. Se jam pro tio ni devus malakcepti la uzon de *jes*, ĉu, do, resti ĉe la alternativo *ja* de PMEG? La ripeta, sed ne unueca alvokado al emfazo en ĉiuj cititaj fontoj escepte de (17a,b) riskas forgesigi pri la kerna signifo de *ja*, kiun Krause resumis ĝuste en (17a,b). Tiuj ĉi uzokondiĉoj, atestitaj en la lingvaĵo de Zamenhof kaj en ĉiuj aliaj ekzemploj, difinas *ja* kiel (re)konfirmilon de jama konateco, evidenteco aŭ komprenebleco de la komunika enhavo, aŭ kiel esprimilon de koncedo aŭ konfeso fare de la parolanto, ke la komunika enhavo estas tio, kio ĝi estas. Ĉio tio estas alia afero ol emfazo. La uzon de *ja* en (19b) diktas iu bezono de emfaza kontrasto, kaj dank' al tiu emfazo el la misgvidaj fontoj, kiujn mi abunde citis, ni aŭtomate alvenas al *ja*. Sed ne ĉiuj inter ni lasas sin persvadi je tiu uzo de *ja*. Konataj lerniloj de Esperanto por nederlandlingvanoj, de la klasika vortaro Van Straaten (1933, 524) ĝis la moderna gramatiko Haveman kaj De Vries (1999, 97) konsilus por (19b) la uzon de *jes* anstataŭ *ja*, malgraŭ tio, ke *jes* devus esti uzata nur eksterpredikate kaj en la frazkomencna pozicio.

Ni rigardu, kiel la konsultita literaturo traktas la dilemon. De Diego (1977) enhavas 42 okazojn de *ja*. Ĉiuj uzoj estas konformaj al la kondiĉoj en (17a,b). Jaman konatecon laŭ (17a) ni trovas ekzemple en *Via moŝto estas ja ŝildisto bona kaj perfekta* (De Diego 1977, 463); ekzemplon de koncedo laŭ (17b) en *Mi ja kredas, Sancho ..., ke vi volas grimpi ĝis la alto* (De Diego 1977, 469). Sed en la sonetversoj (20):

- (19) ĉar **voĉoj** tra la breĉo ne sin tiris;  
sed **ja la koroj**: ilin Am' inspiris. (De Diego 1977, 493, miaj dikigoj)

la partikulo *ja* emfazas la kontraston inter *voĉoj* (kiuj ne tiriĝis tra la breĉo) kaj *koroj* (kiuj, male, tiriĝis) kaj, do, kondutas kontrast-emfaze, laŭ PIV kaj (17c). Berveling (2002) paroligas kelneron, kiu, ne havante iun menditan dolĉaĵon, proponas al la kliento alternativon en (21):

- (20) **Tion ni ne havas. Sed ja kukaĵon.** (Berveling 2002, 33, miaj dikigoj)

En la unua frazo en la originalo, la parolanto neas la haveblon de iu produkto, kiun li enfokusigas per antaŭmeto. En la dua li per la emfaze malnea partikulo *ja* proponas alternativon. Temas pri kontrasta fokuso kun po du kontrastaj elementoj: la du produktoj *tion* kaj *kukaĵon*, kaj *ne* kontraŭ *ja*. Berveling tradukis la emfazan malneon per *ja* - akcentita, mi imagas - laŭ PIV kaj (17c). Tamen, same kiel De Diego (1977), tiel ankaŭ Berveling (2002) uzas multajn *ja* laŭ la kondiĉoj (17a,b), sen ajna bezono de akcentado, ekzemple laŭ Berveling (2002) en (22), kie la teksto nemiskompreneble sugestas jaman konatecon kaj facilan rekoneblon:

- (21) Vi ja konas tiajn ulojn. (Berveling 2002, 25)

En la sume 6348 versoj de Makaŝvili (1989) la vorteto *ja* aperas 164 fojojn, averaĝe po unu fojon en ĉirkaŭ 40 versoj, ĉiuj senescepte en uzokondiĉoj laŭ (17a,b). Ĉu do multaj? Certe pli, absolute kaj proporcie, ol en De Diego (1977) sur ties 800 grandformataj, dense presitaj paĝoj. Nu, kiam tradukanto de poeziaĵo troviĝas en ritma embaraso, la unusilaba *ja* povas prezenti konvenan helpon. Dum temas pri konfirmo aŭ konfeso de konata fakto, la enmeto de *ja* ne donas grandiozan kontribuon al la enhavo, sed ĝi ankaŭ ne vere nocas. Tiaj estas multaj okazoj de *ja*, kiujn mi, do, klarigas per ritma konveno, pli ol enhava neceso. Makaŝvili ne trovis okazon por uzi *ja* kun la emfaza senco de *malne*. Restas, do, De Diego en (20) kaj Berveling en (21), kiuj ŝajnas akcepti la uzeblon de akcentita (?) *ja* kiel malnea partikulo en kontrasta fokuso.

La trakto de emfaza *ja* kiel deviga malnea elemento en kontrasta fokuso riskas trudi al tia enfokusigo devigan akcentadon de la partoprenantaj elementoj, kiu povas ŝajni 'ĝusta' aŭ 'logika' al iuj parolantoj de Esperanto, sed ne necese al ĉiuj. En Esperanto ekzistas nur unu akcent-regulo: tiu, kiu koncernas la vortakcenton. Nenio alia estas certa, de la intonaciaj konturoj de ĉiuj sintaksaj strukturoj (8)–(14) al la akcenteblo de fokuso kaj kontrast-fokuso, ĝis tiu de subvortaj fragmentoj. Tial, supozu la universalan akcepteblon de akcent-ŝablono por kontrastaj fokuso estas aŭdace. Antaŭ ĉio,



mi dirus, ke necesas esplori, ĉu eblas atingi la saman efekton en kontrasta fokuso, uzante *materian* rimedon (t.e. per vortoj, leksikaj aŭ neleksikaj) anstataŭ la *senmaterian* de la akcentado. Se ni volas resti ĉe la uzo de *ja*, ni povus imagi la intonacion de (23), sen la fortaj kontrast-fokusaj akcentoj de (19b):

(22) /Jes | mi ja de/ziras \ion<sup>10</sup>

En (23) mi skizas intonacian konturon, kiun mi opinias kredinda en Esperanto, kaj la uzon de *ja* laŭ la normoj de (17a), t.e. “Jes, mi deziras ion, kaj estas konate, ke mi deziras ion”. Mi devas konfesi, ke kiel denaska parolanto de lingvo, en kiu la emfaza malneo esprimiĝas per aparta partikulo (materie) akompanata de forta akcento (senmaterie), mi devas kutimiĝi al la materia alternativo kun *ja*, kiu fakte nenion malneas, sed nur ripetas kaj emfazas la deziron. Ĝi efektive sonas nekompleta al miaj oreloj, sed kiom valoras tiu percepto de vilaĝano en la mondo? Alternativo povus esti la fendita frazo “Jes, (ja) estas io, kion mi deziras”, sed tiu strukturo ne renkontus ĝeneralan aprobon.

Eĉ se mi kontraŭas trudi al Esperanto la akcentadon/intonacion kiel instrumenton por diferencigi inter malsamaj signifoj, tamen ni ne hezitu registri ĝin, se ĝi prezentas sin kiel akompana fenomeno. Ĝi ja povus malkaŝi al ni transpreneblan universalajon, antaŭ kiu ni ne fermu la menson, eĉ malpli la orelojn. Io simila validus por la interjekcio *nu*, kie trudiĝas al ni la diferenco inter kurta akcentita *nu* por plifortigi ordonon kaj senakcenta longa *nu* por konkludo aŭ tempogajno per paŭzo.

El la vortetoj rikoltitaj en Tabelo 1 restas *jen*, kies uzado ilustrita en PIV (2020) tiel sub *jen*<sup>1</sup>, kiel sub *jen*<sup>2</sup> kaj *jen*<sup>3</sup> montras fiksan pozicion de la partikulo en la komenca pozicio de ĉiu diraĵo, kiu estas trajto de interjekcio. Do, la partikulo *jen* ŝajnas al mi pli simila al interjekcio ol al la kategorio de la pli moveblaj nuanciloj. Pro tio, mi ne hezitis meti ĝin en Aldonon 1, en kiu ĝi povas konkurenci kun *he*, *he ho* kaj *nu*. La frazkomenca pozicio kiel kriterio por similigi ĝin al interjekcio validas ankaŭ por la lasta ero en Tabelo 1, *tamen*, kun ties nuanco ‘malgraŭ tio’. Ĝi ofte okazas duope kun *kaj* aŭ kun *sed*, ankaŭ tiam en la komenca pozicio.

Se ni eliras de la supozo, ke la homa bezono je sentesprimoj havas altan nivelon de interlingva universaleco, kiel jam asertis Privat, kaj ke sentesprimoj kiel ironio, malpacienco, irito, rezignacio, ĝentila insistado k.s., kiuj iom gvidis min en tiu ĉi diskurso, devas esti esprimeblaj en Esperanto, tiam, se mankas al ni partikulaj nuanciloj, necesas aliaj gramatikaj aŭ leksikaj

10 “/” simbolas la ton-altigon, kiun aŭskultanto perceptas kiel frazakcenton sur la sekva silabo.

“\” simbolas la ton-falon, kiun aŭskultanto perceptas kiel frazakcenton sur la sekva silabo.

La signo “|” reprezentas la limon inter du intonaciaj grupoj.

rimedoj.<sup>11</sup> Se Esperanto estas relative malriĉa je tiaj nuanciloj kompare kun etnaj lingvoj (ilia relativa abundo en la nederlanda lingvo tion supozigas), tiam ni aparte atentu la ĝustan uzon de tiuj malmultaj, kiujn ni havas. La nuanciloj, kiujn mi diskutis ĉi-supre, *do*, *ja* kaj *nur*, estas aparte potencaj pro sia kurteco kaj sia praktike nekondiĉita uzeblo (kontraste kun leksikaj kvalifikiloj kiel adverboj). Kiu disponas pri multaj nuanciloj nacilingve, ne facile eskapas de la tento traduki partikulon per partikulo, kun eventuala dezirinterpretado de iu kandidato, des pli, se ties melodio ‘sonas bone’, sed ĝi facile perfidas. Ni ne forgesu, ke tia dezirinterpretado povas parte apogiĝi sur akompana intonacia konturo, kiun la parolanto (mi aŭ vi) mense alvokas el sia gepatra aŭ socia lingvo kaj realigas en Esperanto, sed restas la demando, ĉu per ĝi oni trafas la celatan intencon.

La netradukeblo aŭ ŝajna netradukeblo de partikuloj per partikuloj ne implicas malriĉecon de la lingvo. La vera leciono de la rigardo ekster Esperanton estas, ke en Esperanto ni devas serĉi kompenson por la manko de certaj sent-esprimaj nuanciloj kaj la manko de perakcenta diferencigo, kaj tiun kompenson ni devos trovi aliloke: en sentesprimaj derivaĵoj per *-et*, *-eg*, *-aĉ*, *fi-*; en la ŝanĝeblo de la vortordo, en la uzo de la kondiĉa modo, la apliko de helpverboj kiel *bonvolu* kaj en la pragmatika uzo de leksikaj vortoj kiel *feliĉe*, *bonŝance* (ambaŭ por ĝojo), *fine* (ekzemple por malpacienco aŭ ironio) k.a.

La eblo distingi inter semantika kaj pragmatika uzo de leksikaj vortoj trovas konfirmon ankaŭ en PIV (2020; vidu la kontrastajn interpretojn de *feliĉe*). De Diego (1977) montras ses okazojn de *feliĉe*, poduone kun semantikaj kaj pragmatikaj interpretoj. Tipan ekzemplon de pragmatika signifo ni trovas en (24):

(23) Sed feliĉe la junulo suferis ĉi-foje nenian atakon de frenezo.  
(De Diego 1977, 199)

Ĉi tie *feliĉe* ne esprimas ‘feliĉan suferadon’ de la junulo, sed la ĝojon de la aŭtoro pri la neokazo de frenez-atako. Pragmatike (sent-esprime) uzataj leksikaj adverboj staras fraz-komence, eksterpredikate, kaj ne estas libere moveblaj kiel adverbaj kvalifikiloj ene de predikato.

11 Tiu ĉi konkludo validas ankaŭ por ĉiuj similaj konsideroj kaj juĝesprimoj rilate al la modaleco de diraĵo, per kiuj eblas garni deklaran ilokucion. Por la prezentata studo mi provis limigi min al sentesprimaj nuanciloj, sed kun la detala pritrakto de *ja* mi ne povis ne paŝi trans tiun limon.

## 6 Konkludo

Esperanto disponas pri sufiĉe da interjekcioj por esprimi la bazajn emociojn, kaj eĉ multe pli. Tiuj interjekcioj, kiuj baziĝas sur vortara materialo (*saluton!*, *diable!*, *fek!*, *ek!*, *fi!* k.a.) funkcias senprobleme, sed inter la aprioraj observiĝas tendenco al malpliigo de la nombro da intersimilaj formoj. En la konsultitaj verkoj, la uzo de la *ho*, *ha*, *he(j)* estas neunueca kaj ne spegulas iliajn formalajn difinojn.

La bazaj komunikaj intencoj aŭ gramatikaj ilokucioj, kiuj estas troveblaj interlingve kaj kiuj estas reprezentataj de limigita nombro da karakterizaj frazostruktoj, ekzistas ankaŭ en Esperanto, kiu transprenis tiujn strukturojn el siaj eŭropaj fontlingvoj. Esperanto disponas pri kelkaj partikuloj por individue nuanci la komunikan intencon de la diraĵo: *do* kaj *nu* por la plifortigo de demando aŭ ordono; *nur* estas proponata por la mildigo. *Jen* kaj *tamen* bone funkcias kiel interjekcioj. Mankas en Esperanto (la sekva listeto ne estas necese elĉerpa) nuanciloj por nuanci diraĵon ironie, malpacience, iritite, rezignacie aŭ kun ĝentila insisto. La esprimo de tiuj (kaj aliaj sent-esprimaj) nuancoj devas esti realigata per aliaj rimedoj leksikaj aŭ gramatikaj, kiuj abunde haveblas en la lingvo.

La partikulo *ja* devus provizi diraĵon per nuanco de jama konateco (al la alparolato aŭ pli ĝenerale), sed montras en la praktiko alitipan uzon. Ĝia akcentita apliko en emfaze jesa reago al tuj antaŭa negativa esprimo (kontrasta enfokusigo) baziĝas sur neĝusta interpreto de la originala senco de *ja* kaj sur la malaprobinda apliko de emfaza akcento sur *ja*. La malakcepto de tiu interpreto, siavice, provokas la uzon de *jes* en tiu sama rolo, kiu, pro alia kialo, estas same erara. Kiel alternativa esprimo de kontrasta fokuso estas proponata la uzo de senakcenta *ja* kun ties originala senco, kun malforta kontrast-percepto ĉe iuj, aŭ la apliko de la t.n. fendita frazo, ne aprobata de ĉiuj.

Estus erare preskribi por Esperanto la akcentadon/intonacion kiel instrumenton por diferencigi inter malsamaj intencoj/sencoj aŭ krei kontraston, sed restas interese registri ĝin kiel akompanan fenomenon por malkovri la eventuale spontanegan aperon de universalajoj en la lingvo.

## Bibliografio

- Andersen, Hans Christian. 1992. *Fabeloj*, tradukis L. L. Zamenhof. Tokio: Libroteko. (Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof, 7).
- [ANS] *Algemene Nederlandse Spraakkunst*. 2021. 3-a reviziita eld. <https://e-ans.ivdnt.org/> (12.07.2023).
- Berveling 2002, vidu Carmiggelt 1967.
- Carmiggelt, Simon. 1967. *Morgen zien we wel weer*. Amsterdam: De Arbeiderspers. – Simon Carmiggelt. 2002. *Morgaŭ denove ni vidu*, tradukis Gerrit Berveling. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo.
- de Cervantes Saavedra, Miguel. 1605. *Don Quijote de La Mancha*. Madrid. – Miguel de Cervantes Saavedra. 1977. *La inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha*, tradukis Fernando de Diego. Zaragoza: Hispana Esperanto-Federacio.
- de Diego 1977, vidu de Cervantes Saavedra 1605.
- De Smedt, Petro. 2004. *Nederlands- Esperanto- Nederlands Woordenboek*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo.
- Desmet', Petro. 2019. *Esprimaro. Promenoj en Edeno*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo.
- Ekman, Paul. 1999. "Basic Emotions." En *Handbook of Cognition and Emotion*, redaktis Tim Dalgleish kaj Mick J. Power, 45–60. Hoboken (NJ): Wiley.
- Haveman, Roel kaj Arjen-Sjoerd de Vries. 1999. *Esperanto. Grammatica met oefeningen*. Bussum: Coutinho.
- Hengeveld, Kees kaj J. Lachlan Mackenzie. 2008. *Functional Discourse Grammar: A Typologically-based Theory of Language Structure*. Oxford: Oxford University Press. <https://doi.org/10.1093/acprof:oso/9780199278107.001.0001> (12.07.2023).
- Hengeveld, Kees kaj Hella Olbertz. 2012. "Didn't You Know? Mirativity Does Exist!" *Linguistic Typology* 16, kajero 3: 487–503. <https://doi.org/10.1515/lity-2012-0018>.
- Kalocsay, Kálmán kaj Gaston Waringhien. 1985. *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. 5-a korektita eld. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- König, Ekkehard kaj Peter Siemund. 2007. "Speech Act Distinctions in Grammar." En *Language Typology and Syntactic Description*, redaktis Timothy Shopen, 276–324. Cambridge: Cambridge University Press.
- Krause, Erich-Dieter. 1999. *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch*. Hamburg: Helmut Buske.
- Makašvili 1989, vidu Ŝota Rustaveli 12-a jc.
- PAG, vidu Kalocsay kaj Waringhien 1985.
- PD, vidu Desmet' 2019.
- PIV, vidu Waringhien, ĉefred. 2020.

PMEG, vidu Wennergren 2022.

Privat, Edmond. 1957. *Esprimo de sentoj en Esperanto*. 3-a eld. Hago: Internacia Esperanto-Instituto.

Ŝota Rustaveli. 12-a jc. *Vepĥistkaosani*. – Ŝota Rustaveli. 1989. *Kavaliro en tigra felo*, tradukis Zurab Makaŝvili. Tbiliso: Sabĉota Sakartvelo.

van Straaten, A. G. J. 1933. *Esperanto Woordenboek*. Parto I. Zutphen: Thieme.

Waringhien, Gaston, ĉefred. 2020. *Plena ilustrita vortaro de Esperanto*. Nova eld. kunordigita de Michel Duc Goninaz kaj K. Roux. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda. <https://vortaro.net> (12.07.2023).

Wells, John. 2010. “La frazmelodio en internacia perspektivo.” En *La arto labori kune*, redaktis Detlev Blanke kaj Ulrich Lins, 363–372. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Wennergren, Bertilo. 2022. *Plena manlibro de esperanta gramatiko*. Versio 15.3. <https://bertilow.com/pmeg/> (12.07.2023).

Zamenhof, L. L. 1888. *Dua libro de l' lingvo internacia*. Varsovio. – Represita en L. L. Zamenhof. 1987. *Unuaj libroj por esperantistoj*, redaktis Ludovikito, 43–105. Nova eld. Nagojo: Nagoja Esperanto-Centro. (Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof, 1).

Zamenhof, L. L. 1963. *Fundamento de Esperanto*. 9-a eld. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj.

## Aldono 1

Interjekcioj	PAG	PMEG	PD	Difinoj (komunaj aŭ laŭ PIV)
Oficialaj				
<i>adiaŭ</i>		+		Interjekcio laŭ PIV.
<i>bis</i>	+	+	+	Instigo, peto pri ripeto.
<i>fi</i>	+	+	+	Naŭzo, mallaŭdo, malestimo, abomeno k.s.
<i>ha</i>	+	+	+	Ekmiro, surprizo.
<i>he (1)</i>	+	+	+	Altiro de atento.
<i>he (1) ho</i>	+		+	Altiro (PAG: pli vigla) de atento (PD).
<i>ho</i>	+	+	+	Ĝenerale, viveco de sento.
<i>hura</i>	+	+	+	1. Aklamo de ĝojo, tre forta aprobo. 2. Batakrio.
<i>nu</i>	+	+		1. Ĝenerala atentigo pri io/iu. 2. Instigo al io, ekz-e ekparolo. 3. Sentigo pri konsento/koncedo.
<i>ve</i>	+	+	+	1. Doloro (PAG: patosa); kordoloro (PMEG, PD). 2. Doloro, minaco de malfeliĉo/malbena por iu alia.
<i>ho ve</i>	+		+	1. Kiel ve1 (PAG). 2. Kunsento (PD).
<b>Vortaraj</b>				
<i>amen</i>		+	+	Aprobo (PD).
<i>bas</i>	+			Vigla mallaŭdo (PAG).
<i>brave</i>			+	Admiro, kuraĝigo (PD). Interj. menciita en PIV.
<i>ek</i>	+	+	+	Instigo komenci. Interj. menciita en PIV.
<i>eks</i>		+		Sinonimo de <i>for</i> . PMEG: "iafoje". PIV: malo de <i>vivu</i> .
<i>fek</i>			+	Kolero, malestimo, indigno, malbonŝanco k.s. (PD). Interj. menciita en PIV.

Interjekcioj	PAG	PMEG	PD	Difinoj (komunaj aŭ laŭ PIV)
<i>for</i>	+		+ +	1. Foririgo, forpelo (PAG, PD). 2. Rifuzo (PD). Interj. menciita en PIV.
<i>glut glut</i>		+		Sonimito de glutado.
<i>ĝis (la)</i>			+	Ĝisrevida saluto (PD). Interj. menciita en PIV.
<i>haleluja</i>		+	+	Laŭdo, kontenteco k.s. (PD). Interj. menciita en PIV.
<i>halt</i>	+	+		Averto pri haltigo (PAG).
<i>help</i>	+	+		Peto pri helpo (PAG).
<i>hosana</i>		+	+	Adoro (PD). Interj. menciita en PIV.
<i>jen</i>				Altiro de rigardo aŭ atento. Interj. menciita en PIV.
<i>krak</i>		+		Sonimito de krako.
<i>mur mur</i>		+		Sonimito de murmurado.
<i>pif paf</i>		+		Sonimito de pafado.
<i>plaŭ</i>		+		Sonimito de plaŭdado. Interj. menciita en PIV.
<i>rap rap</i>		+	+	Instigo al rapidigo (PD). Interj. menciita en PIV.
<i>skorzonero</i>			+	Malkontento (PD). Interj. menciita en PIV.
<i>spit</i>			+	Defio (PD). Interj. menciita en PIV.
<i>stop</i>	+ +	+	+	1. Instigo de haltigo (PD). 2. Instigo, ke iu haltigu maŝinon. 3. Instigo al halto (marista lingvaĵo). Interj. menciita en PIV.
<i>tamen</i>				Interj. menciita en PIV.
<i>tin tin tin</i>		+		Sonimito de tintado. Interj. menciita en PIV.
<i>trinĉ tranĉ</i>		+		Sonimito de tranĉado.
<b>Aprioraj</b>				
<i>ah</i>			+	(Ek)miro, surprizo, bedaŭro (PD).

Interjekcioj	PAG	PMEG	PD	Difinoj (komunaj aŭ laŭ PIV)
<i>aha</i>	+	+	+	Ekrimarko, konstato (de io atendita?). Menciita en PIV.
<i>aĥ</i>	+	+		Pli forta <i>ha</i> (PAG). Forta surprizo (PMEG). Surprizo, bedaŭro (PIV). Menciita en PIV.
<i>aj</i>	+	+	+	1. Subita sufero (PAG), doloro (PMEG, PIV), viva doloro (PD). Vidu <i>aŭ</i> , <i>oj</i> kaj <i>huj</i> kiel kvazaŭsinonimoj kun malklaraj nuancoj; <i>aŭ</i> = doloro (PMEG). Menciita en PIV. 2. Tre viva ĝojo.
<i>aŭ</i>	+	+	+	Subita sufero (PAG), doloro (PMEG, PD). Menciita en PIV.
<i>ba</i>	+	+	+	1. Nekredemo (PAG). 2. Senzorgeco (malŝata) (PMEG, PD). Menciita en PIV.
<i>baf</i>		+	+	1. Kiel <i>ba</i> . 2. Pli forta <i>ba</i> . Menciita en PIV.
<i>baj...baj</i>	+		+	Por endormigi infanon (PAG, PD). Menciita en PIV.
<i>be</i>	+	+	+	Konfuziteco. Menciita en PIV.
<i>br(r)</i>			+	Frostiĝo, teruriĝo (PAG, PD). Menciita en PIV.
<i>ĉit</i>	+		+	Por silentigi iun (PAG, PD). Menciita en PIV.
<i>dirlididi</i>			+	Bagateligo de ĵusa diraĵo (PD). Menciita en PIV.
<i>ehe</i>	+	+	+	(Ek)kompreno, kunsento. Menciita en PIV.
<i>ej</i>	+		+	Dubeto, milda malaprobo (PAG, PD). Menciita en PIV.
<i>fr</i>			+	Fortimigo de birdoj (PD). Menciita en PIV.



Interjekcioj	PAG	PMEG	PD	Difinoj (komunaj aŭ laŭ PIV)
<i>fu</i>	+		+	1. Detenata rido (PAG, PD). Menciita en PIV. 2. Laciĝo. Sinonimo de <i>uf</i> (PAG). Menciita en PIV.
<i>ha ha (ha)</i>	+			1. Pli viva doloro (PAG). Menciita en PIV. 2. Ironio (PAG). Menciita en PIV. 3. Rido (PAG). Menciita en PIV.
<i>ha ha ha</i>			+	1. Ironio (PD). Menciita en PIV. 2. Kontenteco (PD).
<i>(ha)( )lo</i>	+		+	Alvoko telefona, altiro de atento (PAG, PD). Menciita en PIV.
<i>he (2)</i>			+	Ironia kontraŭdiro (PD). Menciita en PIV.
<i>he (2) ho</i>			+	Ironia kontraŭdiro (PD). Menciita en PIV.
<i>hej</i>	+	+	+	Kuraĝigo. Menciita en PIV.
<i>hej ho</i>	+			Pli vigla altiro de ies atento (variante de <i>he ho</i> ).
<i>hm</i>	+	+	+	1. Paŭzo diverscela. 2. Atentigo pro ĉeesto, imito de tuso (PAG, PD). 3. Hezito (PD); konfuziteco, ĝenateco (PAG, PD). 4. Atentigo pri ebla kontraŭdiro (PAG, PD). Menciita en PIV.
<i>ho he</i>	+		+	Altiro de ies atento (PAG: de malproksime). Menciita en PIV.
<i>ho ho</i>	+		+	1. Altiro de ies atento (PAG: de malproksime). 2. Miro (ankaŭ <i>ho ho ho</i> ) (PD). Menciita en PIV.

Interjekcioj	PAG	PMEG	PD	Difinoj (komunaj aŭ laŭ PIV)
<i>(ho) hoj</i>	+	+	+	Alvoko (PAG: marista, PD: de malproksime). Menciita en PIV.
<i>ho hu</i>	+		+	1. Altiro de ies atento (PAG: de tre malproksime). 2. Incito (PD). Menciita en PIV.
<i>hola</i>	+	+	+	Alvoko, veko de ies atento (PAG: de malproksime). Menciita en PIV.
<i>hop</i>	+	+	+	Instigo al salto. Menciita en PIV.
<i>ho ruk</i>	+		+	Instigo al komuna fortostreĉo (PAG, PD). Menciita en PIV.
<i>hot(o)</i>	+	+	+	1. Antaŭenigo de ĉevalo k.s. Menciita en PIV. 2. Forpelo de bovo k.s. (PD). Menciita en PIV.
<i>hu</i>	+		+	Ektimo (PAG, PD ankaŭ <i>hu hu</i> ). Menciita en PIV.
<i>hu ha</i>			+	Ekscito (PD). Menciita en PIV.
<i>huj</i>	+		+	Subita sufero (PAG), doloro (PD). Menciita en PIV.
<i>huŝ</i>	+	+	+	Por fortimigi (malgrandan?) beston. Menciita en PIV.
<i>lo</i>	+	+	+	Atentigo (PMEG: nur kune kun <i>ha</i> ). Menciita en PIV.
<i>lu...lu/lulu</i>	+		+	Por endormigi infanon (PAG, PD). Menciita en PIV.
<i>oho</i>	+	+	+	Surpriziĝo. Menciita en PIV.
<i>oj</i>	+	+	+	Facila bedaŭro (PAG); bedaŭro (PMEG); doloro aŭ amara bedaŭro (PD). Vidu sub <i>aj!</i> Menciita en PIV.
<i>o( )kej</i>		+		Konsento, bone.

Interjekcioj	PAG	PMEG	PD	Difinoj (komunaj aŭ laŭ PIV)
<i>pa (pa)</i>			+	Malkontento, ĉagreno (PD). Menciita en PIV.
<i>pa pa</i>	+		+	1. Senzorgeco (PAG). 2. Malkontenteco, ĉagreneto (PIV).
<i>pru</i>			+	Haltigo ekz-e de ĉevalo (PD). Menciita en PIV.
<i>pu</i>			+	Naŭziĝo pro odoro aŭ fiaĵo (PD). Menciita en PIV.
<i>ruk</i>	+		+	Instigo al fortostreĉo. Menciita en PIV kiel <i>ho ruk</i> .
<i>ŝŝ</i>	+		+	Silentopeto (PAG, PD). Menciita en PIV.
<i>ta ta ta</i>			+	Rifuzo pli longe aŭskulti iun (PD). Menciita en PIV.
<i>tju</i>	+	+	+	Fortimigo de besto. Menciita en PIV.
<i>tpr</i>	+		+	1. Ekscito de ĉevalo (PAG). 2. Haltigo ekz-e de ĉevalo (PAG, PD). Menciita en PIV.
<i>ts ts</i>	+			1. Alvoko de knabo, gazetvendisto (PAG). 2. Por silentigi iun (PAG). Menciitaj en PIV.
<i>uf</i>	+		+	Laciĝo (PAG). Faciliĝo post laceco. Menciita en PIV.
<i>uhu</i>	+		+	Alvoko de tre malproksime (PAG). Alvoko de malproksime (PD). Menciita en PIV.

Fontoj: PAG (1985: 174–176), PMEG (2022: §18), PIV (2020), PD (2019: 129).

### Notoj

- (1) Malplena ĉelo (sen “+”) povas signifi mankon aŭ troveblon aliloke en la sama verko, ekz-e sub adverboj anstataŭ interjekcioj.
- (2) Kelkaj konataj leksik-devenaj interjekcioj mankas, kiel *dankon*, *pardonon*, *fulmotondro*, *vivu* k.a.

## Pri la aŭtoro

Wim Jansen (1948–2024) estis aerospaca inĝeniero kaj multjare laboris en la Eŭropa Kosma Agentejo (ESA). Apud tiu fako li forte engaĝiĝis en lingvistiko, magistriĝis pri la eŭska lingvo en la Universitato de Leiden (1989) kaj doktoriĝis pri la vortordo de Esperanto en la Universitato de Amsterdamo (2007), kie de 2002 ĝis 2013 li oficis kiel docento, poste speciala profesoro de interlingvistiko kaj Esperanto.

## About the author

Wim Jansen (1948–2024) was an aerospace engineer and worked for many years for the European Space Agency (ESA). Aside from that area, he was deeply involved in linguistics, obtaining a Master’s degree in the Basque language at the University of Leiden (1989) and a Doctorate on the word order of Esperanto at the University of Amsterdam (2007), where from 2002 to 2013 he was lecturer, subsequently professor by special appointment of Interlinguistics and Esperanto.

## Over de auteur

Wim Jansen (1948–2024) was ruimtevaartingenieur en lange tijd werkzaam bij het Europese Ruimteagentschap (ESA). Daarnaast was hij actief in de taalwetenschap; hij studeerde af in de Baskische taalkunde aan de Universiteit Leiden (1989) en promoveerde in de woordvolgorde van het Esperanto aan de Universiteit van Amsterdam (2007), waar hij van 2002 tot 2013 werkte als bijzonder docent, later bijzonder hoogleraar Interlinguïstiek en Esperanto.

## Expressions of Feeling in Esperanto: the Role of Grammar

**Summary:** Feelings can be expressed in Esperanto by using interjections, adverbs functioning as interjections, and other more or less fixed expressions with a similar meaning. In addition, Esperanto has markers for the expression of nuances that reflect the speaker’s own comment or subjective modality. Here, the grammatical form and the illocutionary content of expressions of emotion in Esperanto are analysed from the perspective of Functional Discourse Grammar. A comparison is then made between the definitions of these forms as they appear in the main dictionaries and grammars of Esperanto (*Plena Ilustrita Vortaro*, *Plena Analiza Gramatiko*, *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*) and examples taken from three literary works translated into Esperanto (Berveling’s *Morgaŭ denove ni vidu*, De Diego’s *La inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha* and Makashvilí’s

*Kavaliro en tigra felo*). Particular attention is paid to the multi-functional word *ja* 'indeed, surely'. The author rejects the hypotheses set out by some observers, in particular the idea that intonation has a regular role to play in the expression of feelings. He also discusses the fact that most speakers of Esperanto learn the language, including the markers for the expression of feelings, in a 'non-native' context.

**Keywords:** expressions of emotion; interjections; words and expressions functioning as interjections

### **Uitdrukkingen voor gevoel in het Esperanto. De rol van de grammatica**

**Samenvatting:** Esperanto beschikt voor het uitdrukken van gevoelens over tussenwerpsels, bijwoorden die in een soortgelijke functie als tussenwerpsels worden gebruikt en andere relatief vaste uitdrukkingen die in een dergelijke betekenis worden gebruikt. Daarnaast bezit het nuancemarkeerders die worden gebruikt om eigen commentaar of een subjectieve modaliteit van de spreker uit te drukken. Dit artikel beschrijft de grammaticale vorm en illocutionaire inhoud van gevoelsuitdrukkingen in het Esperanto vanuit het gezichtspunt van de Functionele Discourse-Grammatica. Het vergelijkt definities in de belangrijkste woordenboeken en grammatica's van het Esperanto (*Plena Ilustrita Vortaro*, *Plena Analiza Gramatiko*, *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*) met het taalgebruik van literaire vertalers (voornamelijk Berveling: *Morgaŭ denove ni vidu*, De Diego: *La inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha* en Makaŝvili: *Kavaliro en tigra felo*). De auteur besteedt bijzondere aandacht aan het multifunctionele partikel *ja* 'inderdaad, zeker'. De auteur gaat in tegen de stelling van geleerden die menen dat intonatie een rol speelt in reguliere gevoelsexpressie. Hij bespreekt het feit dat de meeste Esperanto-sprekers de taal, inclusief gevoelsuitdrukkingen, niet als moedertaal leren.

**Sleutelwoorden:** uitdrukkingen van gevoelens; tussenwerpsels; als tussenwerpsel gebruikte woorden en uitdrukkingen